

Landesverband Rheinland-Pfalz: Gemeinnützigkeit und Kongress

Am 20. Juni fand in Kaiserslautern die Mitgliederversammlung des Landesverbands Rheinland-Pfalz statt, die von Luise Wenig und Dirk Werner Hartmann (Ortsgruppe Kaiserslautern) vorbereitet wurde. Die beiden neuen Mitglieder führten die Teilnehmer nicht nur ortskundig durch die Altstadt Kaiserslauterns, vorbei an dem „kongresajo“ für den gemeinsamen deutsch-französischen Kongress im nächsten Jahr, sondern bewirteten die Teilnehmer auch mit Kaffee und Kuchen, wofür ihnen der Vorsitzende Wolfgang Bohr im Namen aller rheinland-pfälzischer Esperanto-Freunde dankte.

In seinem Bericht erwähnte Bohr besonders die immer intensivere Zusammenarbeit des Landesverbandes mit dem Luxemburgischen Esperanto-Bund, der auch an der Planung des regelmäßigen Treffens in Zell an der Mosel (heuer vom 25. bis 27. September), das sich mittlerweile als regelmäßige Veranstaltung etabliert hat.

Einstimmig wurde eine Satzungsänderung angenommen, die im Wesentlichen eine Anpassung an die anderer Landesverbände beinhaltet. Mit der Beantragung der Gemeinnützigkeit will sich der Landesverband die Vorteile sichern, die mit dieser verbunden sind. Der Vorstand wurde um ein Mitglied erweitert. Dirk-Werner Hartmann übernimmt die Betreuung der wachsenden Zahl von Ortsgruppen. Die bisherigen Vorstandsmitglieder Wolfgang Bohr (Vorsitzender), Werner Faber (stellvertretender Vorsitzender), Klaus Riemann (Kassenprüfer), und Gundega van Raden (Schatzmeister) wurden wiedergewählt.

Die Hauptaufgabe des Landesverbandes für 2010 ist die Organisation des deutsch-französischen Esperanto-Kongresses, der zu Pfingsten in Kaiserslautern stattfindet. Auf dem Programm steht auch die Mitgliederversammlung des Landesverbands. *red.*

Lingvo: Uzo kaj signifo de la prepozicio *ĉirkaŭ*

Unuavide *ĉirkaŭ* estas tute ordinara prepozicio, sed se oni pli detale analizas ĝiajn uzojn kaj signifojn, tiam oni spertas surprizojn kaj eĉ necertecon. Nome, *ĉirkaŭ* prezentas ambaŭ problemojn de du grupoj de prepozicioj:

1. Ĝi foje pliprecizigas nur nombrovorton (kiel *inter, ĝis, sub, super, po*, k.a.), kaj

2. Ĝi servas por indikoj de (2.1) tempo, (2.2) loko kaj (2.3) direkto (kiel antaŭ, tra, inter, ĝis, k.a.).

Krome ĝi povas izolite esti adverbo, sed tiam oni normalkaze aldonas *-e* por atentigi pri tio.

1. Pliprecizigo de nombrovorto

Ĉirkaŭ nur en tiu ĉi funkcio ĉiam signifas ‚proksimume‘, ‚pli-malpli‘ kaj tial kondukas kiel adverbo. Ekzemple:

(1) *Por la aŭto mi pagis ĉirkaŭ dek kvin mil eŭrojn.* (*-n* por indiko de mezuro)

(2) *Ĝis mia hejmo estas ankoraŭ ĉirkaŭ dek kilometroj.* (*kilometroj* estas la subjekto)

2.1 Indiko de tempo

En tempoidikoj *ĉirkaŭ* signifas ‚ĉirkaŭe je‘ kaj kondukas kiel prepozicio. Ekzemploj:

(3) *La festo finiĝis ĉirkaŭ la noktomezo.*

(4) *Mi revenos ĉirkaŭ ĵaŭdo.*

(5) *Ni kunvenu ĉirkaŭ la tria horo.*

Alternativoj estas diskutablaj, sed ne kutimaj:

(3a) *La festo finiĝis noktomeze/je la noktomezo ĉirkaŭ(e).*

(4a) *Mi revenos ĵaŭde/ĵaŭdon/je ĵaŭdo ĉirkaŭ(e).*

(5a) *Ni kunvenu la trian horon, ĉirkaŭe.*

2.2 Indiko de loko

Tio estas la plej ofta uzo kiel prepozicio, tamen oni atentu la signifon:

(6) *La arboj staras ĉirkaŭ la domo.*

La signifo estas: ‚proksime, en ĉiuj di-

rektoj‘ aŭ ‚en la ĉirkaŭ(aj)o‘; sed ne pli detale: ‚cirkloforme‘!

(7) *La hundoj kuras ĉirkaŭ la domo.*
T.e. ie en la ĉirkaŭo, restante tie; ne ne-
pre cirkloforme

2.3 Indiko de direkto per markilo *-n*

La indiko de direkto estas tre malofta.

(8) *La hundoj kuris ĉirkaŭ la domon.*

Ĝi tamen havas diversajn subsignifojn, nome, kiel la aganto (la hundoj) precize moviĝas:

2.3.1 Per movo en la ĉirkaŭon

(8a) *La hundoj kuris (de fore) ĉirkaŭ la domon = en la ĉirkaŭon de la domo.*

2.3.2 Per kurboforma movo pasante objekton

(8b) *La hundoj kuris (de fore) ĉirkaŭ la dom(angulo)n (kaj forkuris denove).*

2.3.3 Per kurboforma movo restante ĉe la objekto kaj revenante unu- aŭ plurfoje al la de-irpunkto

(8c) *La hundoj kuris (trifoje kiel freneze) ĉirkaŭ la domon (cirkloforme aŭ simile al cirklo).*

Okulfrape laŭ la ekstera formo (morfologio) la tri diversaj signifoj (8a) ĝis (8c) ne estas distingeblaj, ĉar ĉiuj havas nur la direktan markilon *-n*.

Ni komparu tiujn rezultojn kun la lingvouzo en la Germana lingvo:

Ĉiam oni povas traduki *ĉirkaŭ* per ‚um ... (herum)‘, sed nur en la funkcioj 1. kaj 2.1 per ‚etwa‘, ‚ungefähr‘.

Distingo inter loko (2.2) kaj direkto (2.3) apenaŭ eblas; foje oni celas substreki la direkton per aldono de *herum*:

(9) *Die Hunde laufen ums Haus.* (verŝajne: 2.2)

(10) *Die Hunde laufen ums Haus herum.* (verŝajne: 2.3.2 aŭ 2.3.3)

La ideo de 2.3.1 estas fremda al la Germana lingvo. La distingo inter 2.3.2 kaj 2.3.3 devas sekvi en la kunteksto.

Rudolf Fischer